

Roberto ZAGO

MARIA

(originale verkita en la Milana dialekto)

Unu-akta monologo

(eldialektigis: Glauco Corrado)

*Loko kiu ajn: preĝejo, domo, strat- aŭ kor-angulo.
Bildo – aŭ statuo – de la Virgulino, kun breto suba.*

Maria

*(Virino, ĉe kiu montriĝas la signoj de nefacilaj travivitaĵoj: popol-devena.
Ŝi kunportas sakon, kiun ŝi apogos sur la grundo je difinita momento de la monologo).*

Aŭskultu! Ni interklariĝu!

Iam oni kuntrenis min al Karavaĝo,
sed vin mi ne vidis.

Tiom multa estis la homosvarmo, ke eble vi interkonfuziĝis
kun ĉiuj fanatikemuloj, kiuj vin alpreĝadis
kaj kiuj poste iris trinki la miraklofaran akvon,
kiel se ĝi estus ŝaŭmo-akvo.

De tie mi revenis kun miaj konvinkoj,
ankaŭ se – kontraŭvole – mi tiam ĉemetis kelkan "Ave Maria"-n.
Alion vi havis por fari ol atenti al mi;
mi sentis min kiel tiuj suduloj,
kiuj elmanĝas figokaktojn kun la tuta ŝelo.
Alie vi estas inventaĵo,
plua foira vendobenketo
kies nura elmontrata varo estas la espero,
kiun oni povas ekpreni tute senpage,
ja ĉiu kapablas el ĝi disdonaci.

Do,
mi ne devus esti ĉi tie por ekfajrigi kandelojn aŭ lumdonilojn,
kaj fakte tiujn mi ne ekfajrigas!
Mi diros la veron; estis malfacile por mi veni:
al mi ŝajnis, ke mi iras al divenistino, por ke tiu legu al mi la manon,
aŭ por peti ian instigon antaŭenteniĝi.
Mi preskaŭ hontas...

Mia patro estis manlaboristo:
li fidis nur je siaj brakoj,
kaj li malestimis la riĉulojn, kiuj lin pagis kiel negravulon.
Li ja, ne havis Madonojn ĉe la muro.
Eĉ! per sakrado li ilin de la muro forŝiris:
kaj tiaj estis la preĝosinsekvoj, kiujn li al mi instruis.

Nu, kial mi venis?
Estas tio, kion mi demandas,
kaj al mi demandis, dum la tuta vojo,
kaj jen mi respondas:
ĉar patrino vi estas, kiel mi;
ĉar oni al vi mortigis la Filon,
kaj tion vi ĉiam antaŭsciis:
ekde la tago en kiu vi lin enmondigis;
ĉar vi vidis, kiam li mortis kiel besto
– aŭ oni tion diras –
kaj, ĉar mi havas knabinon, kiu estas alnajlita en lito,
kaj ŝi ne volas decidiĝi morti,
malsame ol via Filo.
Jen, pro tio mi venis!
Ĉu konsentite, aŭ vi volas, ke mi turnu miajn marŝilojn?

La doktoroj, kiuj ŝin vizitis kaj kuracis, sentencis:
ses monatojn, sinjorino... ne pli longe.
Kaj estas jam de unu jaro, ke ŝi lamentadas sen moviĝ-ebleco,
suferante dolorojn similajn al tiuj de vundita hundino,
ĉe-lite ligita kiel frenezulo:
kaj ĉion ŝi komprenas!

Eĉ pli multe ol mi kaj ol vi!
Klara ŝi estas, kiel lampo centkandela,
kaj, kiel kandelo, blanka kaj vaksosimila.

Nun, diru al mi:
ĉu estas pli juste, ke ŝi restu ĉe ni
aŭ ke ŝi foriru, fine, en paco?
Vi, kiam vi estis sub tiu kruco, kion vi deziris?
ĉu ke la najloj ekkrevu aŭ, ke via Knabo ĉesu suferi?
Ankaŭ mi kiel vi:
nu, respondu!

Sed ne kiel faras la pastroj:
tro facile!
Tiuj bele eligas vortojn el la buŝo,
sed ili ne havas filojn.
Mia patro kutimis diri,
ke la eklezio antaŭen-iras laŭ:
la opinioj de la sinjoroj,
la disdiraĵoj de la pastroj
kaj la mono de la malriĉuloj.
Kion fari je teologiaj klarigoj, tion mi ne scias!
eĉ tro da ili, oni sciigis al mi.

De du mil jaroj vi rigardas la krucumiton
kaj la homoj volas scii, kion vi pensas.
Ankaŭ mi tion vin aldemandas,
sed nur, ne rigardu min kaj sufiĉas:
tion vi faras de ĉiuj bildoj!
Se vi al mi respondas, ke vi esperis, ke li mortos,
ĉi tie mi estas, kaj la samon mi diras.
Mi volas, ke mia knabino ĉesu suferi;
mi volas, ke ŝi mortu ĉi vesperon,
ĉar mi ne plu eltenas, ke ŝi alian nokton pasigos tiamaniere,
mordante la litotukojn pro la doloro,
kiun eĉ la injekcioj ne povas plimildigi.

La homoj venas al viaj sanktejoj
por serĉi sanon kaj liberiĝon de ĉiaj malsanoj:
mi estas antaŭ vi por alvoki la morton.
Kion vi faros?
Ĉu estas pli facile fari miraklon por paralizulo,
kiu volas trakuri la kampojn,
aŭ doni pacon al tiu suferanta knabino?
Oni diras, ke por vi fari miraklojn estas, kiel iri al legomvendisto
por aĉeti ajlon kaj petroselon: tio kostas malmulte.
Se tio estus vera, mi kapablus reciti "Ave Maria"-n,
ankaŭ se mi malbone ĝin memoras.

Mi ne pretendas, ke vi aperu al mi.
Kiu mi estas?
Iu, kiu memoras pri vi nun, kiam mi vin bezonas,
antaŭe vi gravis malplimulte ol unu cepo;
kaj plue, vi estas okupata kun ĉiuj,
kiuj volas gracojn kaj pretendas fuŝaĵojn...
Tamen nun, faru al mi signon,
aŭ ne faru ĝin al mi, sed min elaŭskultu!
Enŝovu vian kapon en la ĉambron de Roza,
momenton rigardu al ŝia patro, kiu konsumiĝas rigardante ŝin
kaj fordonus sian sangon por ŝi,
kiel li fordonis la vinon...
Jes, ja,
li promesis, ke li ne plu trinkos por sia filino,
kaj tio ne ŝajnas vera por iu, kiu ĉiam drinkemis;
jam de unu jaro eĉ unu glaseton li ne englutas...
Poste, vian vizaĝon metu ĉe la vizaĝo de nia stelulino:
ĝin rigardu,
kaj diru ĉu ĝi ne rememorigas al vi la vizaĝon de via Filo!
La samaj spasmoj; la samaj dornoj, la sama neebleco iel interveni.
Nu, faru vi ion por ŝi!
Sed tuj tion faru, mi petas!

(Paŭzo)

Nu, ĉu vi silentas?
Ĉu vi restas senmova?
Kial? Diru al mi: kial?
Eble vi havis neniun, kiu povis aŭskulti vin.
Ĉu estis nenia Madono por alpreĝi,
estis nenia anĝelo, kiun oni povis flugigi ĉirkaŭ la kruco?
Sed ĉi tio ne estas preteksto.
Se tiuj tie estintus, vi ne estus la Virgulino,
la Senmakula, la Ĉielen-irintino...
kaj ĉiuj aliaj nomoj, kiujn oni al vi donas!
Kaj vi ja ne povus fari miraklojn,
elaŭskulti la preĝojn de la malriĉuloj,
havi tiom da preĝejoj kaj preĝejetoj, kiel neniu alia...
Vi meritis por vi la fidon de ĉiuj malfeliĉuloj,
ĉar vi ankaŭ estas malfeliĉulino,
doloranta patrino: kiel mi!
Mi, kiu laciĝis suferi,
eĉ ne, mi laciĝis esti patrino...
Mi ne plu volas esti la patrino de mia filino!
Mi ne plu povas vidi ŝin krucumita!
Scii, ke ŝi estas surkruce!
Surkruce...

(Ŝi haltas, pro emoci-sufoko)

(Longa paŭzo. Ŝi malfermas la mansakon kaj el tiu eltiras etan lumigilon, kiun si ekfajrigas mantreme.)

Jen al vi!
Lumigilon mi ekbruligas: la unuan fojon, tion mi kuraĝas fari.
Se mia patro min vidus, li elbuŝigus tian sakrolitanion,
ke vi devus forfuĝi el la Paradizo kaj promeni aliloke...
Pli multon mi ne povas fari...
Sed estas penado – kredu – kiun mi bonvole surprenas...
Sed nun, faru vi! Ankaŭ malvolonte, sen ia emo;
ĝisgrimpu la firmamenton
aŭ malsuprenfalu kiel stelo dum somero...

Ĉar, se vi tion ne faras... Atentu!
Per ĉiuj kandeloj de la mondo,
mi ekfajrigos ĉiujn bildojn, ĉiujn poŝbildetojn
kaj ĉiujn objektojn, kiuj reklamas vian vizaĝon!
Ĉar kun tia vizaĝo...
oni ne povas trompi miliardojn da homoj, kiuj alpreĝis,
kaj preĝas vin dumtage kaj nokte!
Vi ne povas min trompi, Madono!
Lasu, ke mi nun kriadu laŭvole,
almenaŭ al vi, ĉar kun ŝi mi devas eĉ ridi, kaj esti serena;
Ĉu vi komprenas?
Gaja, mi devas esti, kiel pulo sufokata de matraco...

(Ŝi estas forironta, sed haltas.

Elsakigas ĉifonon malpuregan, kiun si alŝovas ĉe la bazon de la bildo (aŭ de la statuo).

Ĝi estas la mantuko de Roza;
trempita ĝi estas je ŝiaj sputoj,
je la puso, kiu venas el ŝiaj pulmoj kaj hepato...
Ĉu ĝi finaŭzas al vi?
Kaj same mi ĝin metas sub vian nazon:
Imagu, ke ĝi povus esti la tuko, kiun cirkaŭhavis via Filo.
Estas juste, ke la pruvon vi havu de tio, kion mi diris.
Flaru, kiel ĝi haladzas de sufero,
kaj rigardu kia ĝi estas...
Ŝi mordis ĝin per la dentoj por ne elkrii,
ĝin ŝi disĉifonigis per la animo...
Sufiĉas!
Plu nenion mi havas por doni aŭ por diri al vi...
Ha, jes, ankoraŭ ion:
kiam mi ŝin vestos por la lasta fojo – mi ĵuras al vi –
mi metos sur ŝian koron vian portreton,
nek la mian nek tiun de ŝia patro,
ĉar vi estos iĝinta ŝia patrino.
Mi metas ŝin en viajn brakojn...
mi ne plu eltenas...

(Ŝi malapudiĝas. Subite la ĉifono falas. La virino eksentas la falfrotiĝon kaj sin turnas; ŝi vidas la falintan ĉifonon kaj realmarŝas por ĝin remeti sur la breton. Kiam ŝi ĝin prenas per la manoj, ŝi ekrimarkas, ke ĝi ne plu estas la sama. Ŝi ĝin malvolvas: la ĉifono aperas al ŝi senmakula, nova. Ŝi ĝin turnas nekredeme, ĝin striktas kaj poste ĝin palpadas kaj, fine, ĝin ĉeigas vizaĝen por forviŝi la larmojn, kiuj venas el ŝiaj okuloj. Poste, kun pasio, kun ĝojo, rezigneme kaj akcepteme:)

Ho Sinjoro!

Ho, Sinjoro!

Madono! Madono...

Kion vi faris?

Kion vi faris?

La tuko,

ŝia tuko naŭze malpura kaj ĉifoniĝinta

ne plu estas ĝi...

Kion tio signifas?

ĉu Roza mia mortis aŭ vi ŝin resanigis?

Ĉu vi ŝin reigis blanka kaj nova por mi aŭ por vi?

Ne gravas!

Ne gravas!

Vi min elaŭskultis, mi ne plu estas sola,
sola sub mia kruco vi venis por kuniĝi kun mi...

Kaj mi sentas, ke mi estas kune kun vi,

kaj kun ŝi

por ĉiam,

en ĉiu okazo:

ĉu en la sankta vendredo ĉu dumpaske,

tio samas por mi.

Maria kaj Maria:

Mi kaj vi...

Mi kaj vi...

Mi kaj vi...

(La ŝia estas ploro, kiu alportas konsolon).